



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

ENHAVO n-ro 19 > • Kanado • Hispanio • Kroatio • Utila – ĉu? • BETulo < mar 25

Aliro al Kanado por la UK

La federacia registaro de Kanado anoncis la finon de la devigo prezenti negativan KOVIM-teston por plene vakcinitaj vojaĝantoj. Jen bonvena novaĵo por la Universala Kongreso en Montrealo, ĉar tio signifas, ke la plene vakcinitaj vojaĝantoj ne devos fari la testadon en siaj hejmlando, antaŭ alveno Kanaden, nek fari KOVIM-teston. Hazarde elektitaj homoj tamen devos trapasi PCR-teston je la alveno, sed ne devos izoliĝi dum ili atendas la rezultojn. “Simple alvenu, plenvakcinita, en bona sano kaj bona humoro, por ĝui la plej grandan Esperantan eventon de la jaro!”, diras Jenja Amis, sekretario de la LKK por Montrealo.

La registaro de Kebekio anoncis mildigojn rilatajn al KOVIM-reguloj. Ekde marto 2022 la registaro de Kebekio ne plu starigas limigojn pri la kvanto de personoj, kiuj povas ĉeesti kune en la sama ejo. Kaj vakcin-pruviloj ne plu estas bezonataj por partopreni kongresojn aŭ viziti aliajn lokojn – ekzemple restoraciojn, koncertejoj, kinejoj, teatrojn, ktp. Krome, ekde marto, oni ne plu estas devigata labori dehejme kaj la neceso porti la maskon fariĝas malpli strikta – nur en la publika transporto.

Jen la vakcinoj, kiuj nun estas akcepteblaj por eniri Kanadon:

AstraZeneca/COVISHIELD (ChAdOx1-S, Vaxzevria, AZD1222);
Bharat Biotech (Covaxin, BBV152 A, B, C);
Janssen/Johnson & Johnson; Moderna (mRNA-1273);
Novavax (NVX-COV2373, Nuvaxovid, Covovax);
Pfizer-BioNTech (Comirnaty, tozinameran, BNT162b2), ankaŭ por infanoj inter 5- kaj 11-jaraj.
Sinopharm BIBP (BBIBP-CorV); kaj Sinovac (CoronaVac, PiCoVacc). La lasta dozo devas esti ricevita almenaŭ 15 tagojn antaŭ la alveno al Kanado.

La reguloj por vojaĝantoj legeblas ĉe voyage.gc.ca/voyage-covid (france) kaj travel.gc.ca/travel-covid (angle). La reguloj povus ŝanĝiĝi en la venontaj monatoj.

“Tio estas bonvenaj ŝanĝoj, kaj federaci-nivele, kaj provinc-nivele”, diras la prezidanto de LKK por Montrealo, Normando Fleury. “Tio efektive signifas la verdan lumon de la registaro al kongresoj kaj aliaj eventoj”, aldonas Jenja Amis: “Kanado estas tre sekura lando, kun pli ol 80% da loĝantoj plene vakcinitaj. Aldone, dum la UK estos surloke kongresa kuracisto kaj la protokolo kaj rekomendoj por protekti la sanon de ĉiuj partoprenantoj estos sekvataj.” Aliĝi al la 107-a UK eblas en uea.org/kongresoj/alighilo (kun rabato ĝis la 31-a de marto 2022):

Bonvenon al Montrealo, en plena sekureco!”

Densigita el la gazetara komuniko de UEA.

Pli da riĉaĵoj el la Belartaj Konkursoj

"La stranga butikumo" de Francisco Javier Moleón ricevis la unuan premion en la Belartaj Konkursoj de UEA 2020:

<https://youtu.be/fmrC3AijtO4>

Liven Dek

Hispana kongreso aprilo-fine

Ni memorigas ke inter la 29a de aprilo kaj la 3a de majo disvolviĝos la 80a Hispana Kongreso de Esperanto, ĉeeste en la urbo [Comillas](#) (Kantabrio, norda Hispanio). La evento fariĝos ŝanco renkonti novajn kaj malnovajn amikojn, praktiki la lingvon, ĝui la esperantan kulturon kaj ankaŭ koni urbon historian kaj monumentan kaj regionon kun [riĉa historio kaj superba naturo](#).

En la paĝo esperanto.es/kongreso vi povas trovi jam multajn informojn, kiuj iom post iom aktualiĝos dum venontaj semajnoj. Vi povas krome aliĝi en [tiu ĉi ligilo](#), kaj, se vi jam estis aliĝinta por la unua eldono antaŭvidita por 2020, ne forgesu konfirmi vian ĉeeston ĉe la adreso de [la organizantoj](#) en kongreso@esperanto.es.

[Ni atendas vin en Comillas!](#)



Laŭ BIT-Bulteno 79

Unuopa iniciato el Etiopio

Skribas nia samideano Habtom Tesfamicael el Adisabebo: "Mi atingis kvin homojn interesiĝantajn pri Esperanto, kiuj kapablas komuniki per *Zoom*. Tri tagojn en la semajno dum unu horo ni tiel lernos. Poste ni komencu en lerno-ĉambro apud mia labora loko. Mi estas informanta kelkajn homojn en *Abesynia Bank*, juna asocio en Adisabebo kaj aliajn organizaĵojn.

Pere de Renato Corsetti.

Slovenio raportas pri kroata progreso

Kroata Esperanto-Ligo prezentis en januaro 2022 sian novan retejon kadre de la projekto 'Esperanto – la diĝita prilaboro de la nemateria kultura heredaĵo', kiun finance subtenis la Ministerio pri kulturo kaj medioj de Respubliko Kroatio.

Kvar slovenaj geesperantistoj virtuale ĉeestis la videokonferencon okaze de la malfermo de nova paĝaro de KEL. Entute aliĝis al la hibrida evento 21 komputiloj aŭ telefonoj, kelkaj el ili estis en la oficejo de KEL kun pliaj ĉeestantoj.

La malnovaj retpaĝoj, kiujn gvidis la forpasinta Davor Klobuĉar, kaj ĉiuj materialoj sur ili estos daŭre disponeblaj ĉe la butono 'Arkivo'. La novaj retpaĝoj estas desegnitaj kiel loko kie ĉiuj interesuloj povas ekscii bazajn informojn pri Esperanto en Kroatio kaj vidi la lastajn novaĵojn. Novajn retpaĝojn prizorgas la teamo de Studenta

Esperanto-Klubo: Mihaela, Đivo, Robi kaj Roberto. Estonte oni prezentos kelkajn ĉapitrojn el la riĉa historio de Esperanto en Kroatio en nova kaj interesa maniero. Vizitu la paĝaron per <https://esperanto.hr/wp/>.

OK., laŭ informo en Slovenaj Informoj, marto 2022.

UTILA - limigita atingo!

UEA per sia komisiito lanĉis pli utilan manieron, ke niaj Landaj Asocioj raportu kaj pritaksu siajn agadojn. Malmultaj reagis. En Eŭropo nur Hispanio, Italio, Kroatio, Norvegio, Svedio kaj Svislando. El Ameriko, nur Kanado. El Azio, nur Japanio kaj Vjetnamio, el Afriko, nur Togolando. Se el iu alia lando venis reago, kiun mi ne agnoskis, bonvolu reklamaci al mi!

Unu el la gravaj celoj de la projekto UTILA estis ne plu turmenti landojn unuope por la ĝisdatigo de tekstoj por <Landa Parad'> por 2022. Ŝajne malmultaj komprenis tion, spite la klarajn informojn pri tio.

Hodiaŭ la teksto por <Landa Parad'> por la regiono MONA iris al la ĉefaj agantoj tie kaj ene de kelkaj tagoj iros por plia kontrolo. La aliaj versioj de <Landa Agad'> por 2022 sekvos en la prilaboro.

Belus se oni pli vaste komprenus, ke <Landa Agad'> donas ege bonigitan version de la siatempa Jarlibro de UEA pri la landa agado.

SMG

Li trumpete protektos min

La urbestro de Klajpedo – Alta Protektanto de BET-56, Vytautas Grubliauskas akceptis la proponon de Litova Esperanto-Asocio kaj konsentis esti Alta Protektanto de la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56), kiuj okazos inter la 9a kaj 17a de julio 2022 en Klajpedo. Vytautas Grubliauskas havas kulturalan edukon, kio estas malofta fenomeno por politikistoj. Lian tutan vivon akompanas muziko. Vytautas Grubliauskas naskiĝis en 1956 en Klajpedo, kaj dum 1963-75 li frekventis mezlernejon, samtempe ankaŭ specialan muzikan lernejon kaj dum sep jaroj kantis en la knaba koruso Gintarėlis. En 1975 li studentiĝis en la Klajpeda fakultato de Litovia Ŝtata Konservatorio kaj en 1980 diplomiĝis kiel orkestrestro kaj soloisto



ILEI en Oceanio

Oceaniaj projektoj nun inkluzivas planojn por prezenti Esperanton kiel taŭgan elekton al *Montessori* lernejoj, *Steiner/Waldorf* lernejoj, Infanaj Hejmlernantoj kaj Gepatroj de Infanetoj.

Jen la fejsbuka grupo [Esperanto Education in Oceania \(ILEI Oceanio\)](#)

Alia oceano: Skandinavoj surmare kongresos

Esperanto-renkontiĝo meze de krosado sur la alta maro. Jen la celo de la Tria Skandinava Kongreso de Esperanto. Tiu evento estas planita por okazi inter la 27-a kaj la 30-a de majo 2022, inter la havenoj de Oslo (Norvegio) kaj Kopenhago (Danio).



La aranĝo havos lokon sur la ŝipo *M/S Crown Seaways*, kun minimuma aliĝo de 35 parto-prenantoj, se la sanitariaj kondiĉoj permesos. Ĉiuj kongresanoj devos prezenti vakcinan pasporton. La

organizado de tiu kongreso estas sub la respondeco de Dana Esperanto-Asocio. La programo konsistos el prelegoj, ekskursoj en la urboj kie la ŝipo albordeĝos kaj artaj prezentoj.

La ŝipo foriros de Kopenhago vendrede la 27-an de majo je 14:00. Estu preta surŝipiĝi je 13.00. (Porinforme, la ŝipo mallonge alkajiĝos en Fredrikshavn, tamen meze de la nokto.) La ŝipo alvenos en Oslo sabate la 28-an de majo je 09:15. Ekskurso en Oslo al la Munch-muzeo. La ŝipo reiros al Kopenhago je 14:00. Komuna vespero je 20:00.

La ŝipo revenos en Kopenhago dimanĉe la 29-an de majo je 09:15. Elekti unu (aŭ neniun) el tri ekskursoj en Kopenhago. La ŝipo reiros al Oslo je 14.00

Detaloj ĉe www.esperantonordio.org/kongreso.

Trilingva komuniko el la Nov-Jorka oficejo

La prelego de d-ro François Lo Jacomo al la Ĝenerala Konferenco de Unsko, estas nun akirebla en Esperanto, la angla kaj la franca. Ni alkroĉas la dokumenton, kaze, ke vi povu uzi ĝin en viaj informaj agadoj.

===== vortoj: 1295 =====

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunajo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.